— — Kion ni, havinte spertojn, jam antaŭ kelke da jaroj konstatis kaj antaŭdiris, tio hodiaŭ plenumiĝas: la esperantismo, ĝis nun apogilo por ĉiu ajn, kiu serĉis eniron en niajn esperantistajn societojn, cedas al la kruda vivregularo kaj komencas vidi sin devigata distingi oficiale la homojn laŭ ilia interna valoro Estas ja tre nature, ke la idealeca publiko esperantista rekte instigis praktikan entrepreniston kaj aferiston, ke li profituzu tiun ĉi tolereman karakteron esperantisman por siaj famo kaj intereso. – Ne estas merito starigi novan esperantan entreprenon, fondi novan klubon, promesi eldonadon de nova gazeto, malhelpi unu esperantistan entreprenon por povi valorigi sian, eble eĉ multe malpli taŭgan laboron k. t. p. Absolute ne! Merita ni nomas sole tian agadon, kiu, ekfunkciigante ion, garantias kaj laŭbezone subtenas ĝian vivon per ĉiuj fortoj kaj rimedoj. „Redaktoro", kiu, fondante novan gazeton, fidas sole je sufiĉa enspezo de la abonoj, de kiuj sole dependos la vivo de lia entrepreno kaj kiu estas decidita tuj ĉesigi ĝian eldonadon en okazo de malprofito, alportas al nia afero pli grandan malprofiton ol tiu, kiun neniam ekokupis la ambicio „servi la esperantan movadon". Verkisto, kiu eldonadas lernolibrojn, kopiante ilin el iu fremda lingvo (eĉ ne citante la fonton) kaj kiu por ilia titolo ne hontas transpreni titolon de verko aprobita kiel pli rekomendinda, kulpiĝas ne sole kontraŭ la aŭtora rajto, sed tiu ankaŭ forte malakceliĝas nian movadon, malhelpante al pli bonaj verkoj eniron inter la publikon.

Tiel aspektas la agadmaniero de la malaprobe taksita „martiro poresperanta" rigardata de proksime.

Sed ni havas ankoraŭ pli doloran sperton: ĝi rilatas la historion de la bohema eldono de niaj „ŝlosiloj" de Ĉefeĉ. S-o Čejka, kiu eksciis, ke la manuskripto estis ĉe la okazo de la kongreso en Genève prespreta, antaŭvidante en tiu ĉi ideale praktika propagandilo danĝeron por sia preparata broŝureto (kiun li laŭvorte kopiis el la franca „ruĝa broŝuro") decidiĝis haltigi almenaŭ

se ne estis eble malebligi la aperon de la bohema ŝlosilo. Sub pretekste, ke li mem estas kapabla servi tuj al la eldonisto per sia manuskripto por ŝlosilo, li sukcesis haltigi la eldonon por preskaŭ unu jaro: kiam fine post multaj urĝpetoj li sendis ian presaĵon (tute ne uzeblan!) al la eldonisto en London. tiu ĉi trovis, ke li fariĝis ofero de sperta aferisto kies „propagandan“ penadon direktas sole zorgo pri la poŝo. Nur nun estis la unue aludita, antaŭ longe preparita manuskripto uzita! La celo estis de li atingita — intertempe vastiĝis la dudekheleraj, por Bohemoj ne plej taŭgaj, kopiitaj „ruĝaj broŝuroj“ Petit Manuel — Malá učebnice. Kaj kiam fine aperis la bohema „Čefeč“, tiam li konsideris „plej utila por la propagando“ laŭlitere kopii la tekston de la ŝlosilo kaj eldoni ĝin sur unu folio. „Lia“ — t. e. de Hachette bohema broŝureto servis post kelka tempo refoje al simila celo: kiam aperis la „Plena metoda lernolibro“ verkita de Kühnl, li anstataŭis la kovrilon de „sia“ broŝuro per nova, surportanta titolon: „Plena metoda lernolibro“. Ni eĉ ne perdas la vortojn pri lia pli granda lernolibro, kiu estas laŭvorta transskribo de la Zamenhofa Fundamento.

Juĝante laŭ la supra proklamo de I. A. I., ni vidas, ke similan komedion ludis nia eminentulo ankaŭ kun tiu ĉi internacia korporacio, proponinte al ĝi sian laboron (ne estinte petata) kaj eldoninte sume dum la tri jaroj tri numerojn de „monata organo“. Ĉu iu asertos, ke li helpis nian aferon inter la internacia instruistaro per tia konduto? Cetere li estas jam sperta en tiaj aferoj! Ankoraŭ de la jaro 1905, kiam li subite ĉesis eldonadi sian esp. gazeton por Bohemoj en mezo de la jaro. li ŝuldas al la abonintoj la lastajn tri numerojn, kvankam li estis ricevinta eĉ monsubtenon de la Esp. Klubo en Praha. La klubo, kiu vidis, ke sukcesa propagando dependas unuavice de la ekzisto de organo, ekdecidis post malapero de lia gazeto fondi novan organon en Bohemujo. Tuj, kiam tion eksciis s-o Čejka, li repromesis la pluan eldonadon kaj atingis eĉ tion, ke oni subskripciis por lia entrepreno sufiĉe grandan sumon. Malgraŭ ĉio tamen li dum la tuta sekvanta jaro nenion eldonis kaj la urĝleterojn el Praha eĉ ne respondis. Tio estas la kaŭzo, kial la traktadoj kun li estis interrompitaj kaj kial „Časopis Českých Esperantistů“ fondiĝis en la jaro 1907. (Sekve post paŭzo de 15 monatoj.) Ni ne citus la historion — sed ni vidas, ke ĝi ripetiĝis rilate la „Pedagogian Revuon“. En ambaŭ okazoj estas lia celo klarvidebla: garantii al si por entreprenoj, kiuj hodiaŭ ne estas ankoraŭ profitodonaj, liberan vojon por tiu tempo, kiam ili povos alporti financan rekompencon. Tiel agas Esperantisto praktika, sperta aferisto: la adorantoj de esperantismo, vidantaj en ĉiu Esperantisto amikon samidean kaj samidealan, senvoĉe toleras fariĝi liaj tondotaj ŝafidoj! — Plene estis interrompitaj la rilatoj inter la Esper. Klubo en Praha kaj s-o Čejka, kiam ĉi tiu (ĝia honora membro) estis eksigita el la Klubo. (En neniu bohema klubo esp. li iam estis membro!!) Tio okazis pro lia fidemo al anonimaj, kalumniaj leteroj, kiujn li estis ricevanta de siaj konfidenciuloj — membroj de la klubo (kiuj, kompreneble, ne plu estis longe tolerataj en la klubo); — estas fakto bedaŭrinda, ke progresema instruisto skribe sin esprimis pri anonimaj leteroj, ke li konservos ilin, por ke ili foje atestu la veron.

Pli ol unu fojon havis B. U. E. okazon. esti senindulge kritikata precipe el la vicoj de samideanoj-instruistoj pro la forlokigo

de tiu ĉi „oferema propagandisto". Ili serĉis en tiu ĉi ago ofendon de la tuta bohema instruistaro. Ĉu la samaj sinjoroj ankaŭ hodiaŭ indigniĝos kontraŭ J. A. J., aŭ ĉu ili tamen trovos, ke unu individuo kaj ĝia konduto — ĝi apartenu al kiu ajn nacio, al kiu ajn societa klaso — ne estas pro siaj kondamnindaj faroj imuna kontraŭ justa kaj laŭmerita malŝato?

Sur ĉi tiu karaktero unuavice bazas la „kontraŭpezo" de Centra Asocio Bohema Unio Esperantista, fondita de la membroj, eksigitaj tiame el la Esp. Klubo en Praha. Pro la sola ignorado de tiu ĉi „tiom meritoplena eminentulo" suferis B. U. E. kelkafoje riproĉojn ja eĉ atakojn de „esperantismistoj". Sole la blindiga interna ideo de esperantismo devigis nin ĝis nun silenti pri tiuj ĉi niaj iom internaj aferoj, ĉar nur tre malmultaj estus kredintaj voĉon de sampatrujano kaj oni suspektus nin pro kalumniemo. Ni mem estis jam sanigitaj el t i a esperantismo antaŭ longa tempo kaj la ĉefan meriton pri tio havas „la martiro por Esperanto, la eminenta, meritoplena propagandisto" s-o Cejka.

Ni preferus ankaŭ nun silenti pri tiuj ĉi aferoj, sed ni vidas, ke ili fariĝas tiom gravaj, ke estus rekta peko kontraŭ la vera interna ideo de Esperanto, se la Esperantistoj fermadus propravole siajn okulojn antaŭ tiaj faktoj kondamnindaj. Danke tiajn ĉi karakterojn, kiuj komprenehle ĉie, en ĉiu nacio aperas, kiujn eĉ la esperantismo ne estas kapabla forigi, oni skribis fremdlande en la lasta tempo pri niaj bohemaj aferoj kun tia mentora aplombo, kiel vidiĝas en „Germ. Esp." kaj „Le Monde Esp." Estas nepre necese vidi en esperantismo ion tute novan kaj ni estas feliĉaj, ke ni la unuaj atentigas pri tio.

KANTO DE ESPERANTISTOJ.

Por solena memorigo de Esperantista Klubo en Praha, fondita la 9. XII. 1902.

Melodio: Hej Slované!

1. *Ho, vi fratoj, kunvenante fortojn ekzamenu,*
pacience novajn provojn ni tuj entreprenu.
Veku, veku! Verda stelo supren jam leviĝas,
[por la grava sankta celo, jam homar' vekiĝas].

2. *Rememoru, niaj fratoj, kiom da laboro*
nia Majstro oferdonis per amanta koro,
pro la amo al homaro kaj por Esperanto!
[Vivu nia kara Majstro, vivu Mondsavanto!]

3. *Regu amo, ne la glavo sangon soifanta!*
Kompreniĝo kaj la paco regu Esperanta!
Unu lingvo, ama leĝo, unu mondnacio,
[en konsento regu ĉiam kiel unu Dio!]

Em. Batěk, Říčany.

PLI MULTE DA RESPONDECA SENTO!

— — Ni ne povas silenti kaj lasi sen respondo tiun ofendan manieron, per kiu la redakcio de „Germana Esperantisto" sin opinias esti rajtigita antaŭ la tutmonda publiko akuzi la bohemajn Esperantistojn pri grava kulpo, kiu neniam estus pardonebla.

En sia 11. n-o skribas „G. E.“, ke la II. Konferenco en Praha sekvigis verŝajne pro la tumultaj scenoj la subitan morton de nia amiko prof. Dr. Lederer. Ni atentigas pri la proklamo de s-o Dr. Bischitzky, lia persona amiko kaj kuracisto, kiu mem trovas bezona per la sekvantaj vortoj instrui la publikon pri tio. kio estas vero kaj ne „espereble nur nepruvita famo“.

Sinjoro Dr. Bischitzky proklamas: La aludo de Germana Esperantisto en la artikolo „Iom pli da respondeca sento“ (11 n-o 1911 pĝ. 222.) kvazaŭ „la bedaŭrinda morto de s-o Prof. Dr. Lederer estus sekvo de partopreno en ekscitanta prepara kunveno por la konferenco“ estas tute senbaza, ĉar mi, kiel lia persona kuracisto konstatas, ke la morto estis sekvigita de subita korhalto pro kronika kormalsano.

Sub „respondeca sento“ ĉiu, eĉ la redakcio de „G. E.“ nepre komprenu la devon, raporti sole pri aferoj, pri kiuj oni estas detale informita kaj kiuj estas faktoj pruvitaj, kaj ne ĵeti en la mondon iun el la vento kaptitan sciigon pri io, kio estas „espereble nur nepruvita famo“.

Ni kompreneble ne celas, ke oni forigu el la kolonoj de nia gazetaro ĉian kritikon pri esperantaj aferoj. Sed oni bone atentu, ke la kritikoj ne atingu tian gradon, kiu povas esti danĝera por ni. Ni estas ĉirkaŭataj de malamikoj, kiuj kun argusaj okuloj observas nin: ili ofte uzas eĉ la plej malgravan, ofte n e p r i p e n s e f a r i t a n disputon en niaj gazetoj, por fanfarone kaj trogandigante aserti ĉion malbonan pri la Esperantistoj kaj ilia laboro. Do, kolegoj (redaktoroj) esperantistaj estu singardemaj kaj pripensu antaŭ la publikigo, ĉu viaj kritikoj pri okazajoj en Esperantujo kaj a t a k o j al aliaj samideanoj estas j u s t a j kaj vere necesaj.— Tiu ĉi admono ne estas, kiel iu povus eble opinii, voĉo de ofenditoj, serĉantaj protekton ĉe la publiko, sed ĝi estas vortoj ĉerpitaj el la sama artikolo de „G. E.“ „Pli multe da respondeca sento“. — Bedaŭrinde ne direktiĝas laŭ ili eĉ la skribinto mem.

Cetere, se ni volus esti malicaj kaj venĝemaj, ni povus raporti pri l a ŭ f a k t a j detalajoj el la interna vivo de la germanujaj organizajoj (kaj ankaŭ la aŭstriaj), kiuj ankaŭ neniel havas la rajton fanfaroni antaŭ de la mondo pri sia kompreno de esperantismo kaj esti mentoroj de la alinaciaj organizajoj. unuavice ne esti mentoroj de nia Centra Asocio B. U. E.

En la unua n-o 1912 ne rifuzis al si la sama redakcio la ĝuon refoje kalumniomakuli nian esperantistaron en sia raporto pri la pasinta jaro. Aludante Bohemujon, la redakcio preferis silenti pri la sukcesoj de Esperanto ĉe ni kaj trovis tre bezona skribi la sekvantan frazon: „Die Zänkereien in Österreich zwi-

schen den beiden tschechischen Esperanto-Vereinigungen hätten gewiss bei etwas mehr Esperantismus vermieden werden können.“ (La interdisputoj en Aŭstrio inter la ambaŭ b o h e m a j esperanto-unuiĝoj estus povintaj ĉe iom pli multe da esperantismo esti evititaj.) Ni energie protestas, ke iu alkomparu nian Centran Asocion B. U. E. al grupo da kelkaj individuoj *) trompantaj la mondon per grandbuŝa titolo (elektita por la fondita de ili societo, kies celon ili difinis per vortoj „esti kontraŭpezo de Unio, ĝin ekstermi“), precipe ni ne toleros tion de tiuj, kiuj mem havas sufiĉe da balaindajo antaŭ sia propra sojlo.

ESPERANTA MOVADO INTER BOHEMOJ.

Všem svým přátelům doporučujeme, aby se přihlásili za členy místních spolků esperantských. Tím získávají výhod, jichž by jinak dosáhnouti nemohli. Příležitost konversace, spolková knihovna, časopisy esperantské z ciziny, které klub pro své členy odebírá, sleva na různých publikacích (na př. tato revue zasílána jest členům sdružených spolků za sníženou cenu K 2·50 místo 3 K, učebnice za cenu 2 K místo K 2·40) zajisté plnou měrou vynahradí nepatrný příspěvek spolkový. Nehledě k těmto jmenovaným výhodám, podporuje každý přítel naší věci svým členstvím ve spolku morálně celé hnutí propagační, jež v první řadě závisí na spolcích, které bez dostatečného počtu členů nemohou svou činnost podle potřeby rozvinouti. Téměř v každém větším českém městě propaguje Esperanto místní spolek.

Kdo sídlí v místě, kde dosud klub založen n e n í, přihlaš se za člena svazu j e d n o t l i v c ů „Ligo de Bohemaj Esperantistoj“ sídlem v Praze. Za roční příspěvek 4 K jest členům zasílána zdarma tato revue, odznak a knihovna nejnovějších děl esper. (viz seznam nových děl zařazených do knihovny v této rubrice). Adresujte přihlášky redakci „Časopisu Českých Esperantistů“ v Praze II., Dittrichova ulice 7.

V P r a z e ustaven byl r. 1902 první český spolek esperantský v Čechách. Členové dostávají za pololetní příspěvek 2 K zdarma tuto revui (bez revue 1 K pololetně), mají k disposici knihovnu o 500 svazcích, 30 cizích časopisů esperantských a příležitost súčastňovati se pravidelných konversačních večírků, které se konají každý pátek ve spolkové místnosti rest. „u Donátů“ ve Spálené ul. Adresa: Esperanto-Kancelario en Praha II. Vodičkova ul. 38. (Por sekretario de la „Klubo“).

Tamtéž přijímají se přihlášky ke spolku „Bohema Propaganda Societo Esperantista“, jehož cílem jest starati se o šíření Esperanta po stránce propagační: udržováním okružní výstavky, vydáváním tiskopisů, poskytováním všelikých informací a pokynů k pořádání přednášek a zakládání spolků. Roční členský příspěvek 2 K.


Jmenovaná kancelář ochotně sdělí adresu sdruženého spolku sídlícího v místě, kde tazatel přeje si státi se členem: na příklad: Žižkov (Krásova ul. 30, s-o J. Kopecký); Smíchov (Plzeňská tř., s-o J. Podlipský, drogisto); Libeň (s-o J. Šídlo, Erbenova 859); Ml. Boleslav, Č. Budějovice, Ústí n. L., Hradec Král., B r n o (s-o

*) Vidu: La blindiga Esperantismo.

D. Konečný, Körnerova 17), Kukleny, Nymburk. Písek, Plzeň, Kladno, Praskačka, Louny, Trutnov, Vsetín, Vinohrady (Grupo: Zlatá Koruna, Roudnice; Radvanice-Slezsko (s-o F. Dvorník), Golčův Jeníkov. Tábor. Soběslav. Hrobce. Vídeň (XVIII. Gürtel 61, s-o K. Macháček), Kutná Hora, Semily-Bytouchov, Rakovník. Nový Bydžov. D. Ředice u Holic, Humpolec.

„Ústřední Svaz Bohema Unio Esperantista" sdružuje české spolky esperantistské v Předlitavsku, čímž všichni členové spolků stávají se současně členy ústředí. Příspěvek za své členy (10 hal. čtvrtletně za každého člena) platí spolky pokladně Unie samy. Spolky a jejich členové požívají všech výhod poskytovaných Unií (viz propagační tiskopisy, na př.: slevy na odznacích a na veškerých publikacích Unie i redakce Č. Č. E.) a mají za povinnost zasílati pouze čtvrtletní zprávy o své činnosti. Officielní zprávy spolků jsou zdarma uveřejňovány v „Č. Č. E.". Adresa Unie: Esperanto-Kancelario Praha II. Vodičkova ul. 38.

ČESKÝ KLÍČ ESPERANTA, o jehož II. vydání psali jsme již v posledním čísle loňského ročníku (V.) byl nám zaslán z Londýna, kde jest tištěn, v několika tisících exemplářů, takže můžeme vyříditi všechny objednávky obratem. Cena klíče: 5 hal., 50 ex. 2 K vyplaceně. Adresa: Praha II. Dittrichova ul. 7.



En tiu ĉi jaro ni ricevis jam de diversaj flankoj tre kontentigajn sciigojn por tiu ĉi rubriko. La vintra sezono, kiu sendube estas la plej taŭga por pozitiva laboro, ĉiam gajnas por nia lingvo vicon da novaj adeptoj. Pro ĉiam multiĝanta nombro de kursoj ni raportados pri ĉiuj entreprenoj kiel eble plej mallonge kaj koncerne la amuzojn, aranĝatajn de niaj samideanoj ni citas speciale sole la esperantajn pecojn de la programo.

La urba konsilantaro de Karlín subvenciis la laborojn de nia Centra Asocio B. U. E. per donaco de kvindek kronoj. Ni ĝoje notas ĉi tiun fakton, kiu vicigas la bohemajn urbojn inter tiujn en fremdlando, kiuj same komprenas kaj helpas la propagandan laboron de Esperantistoj.

En la palaco de artoj „Rudolfinum" en Praha malfermis nia bone konata samideano s-o Havelka, eksasistanto de la reĝa akademio en Leipzig, ekspozicion de siaj skizoj kaj laboroj el fako de artista presaranĝo, mandesegnitaj titolornamoj, afiŝoj kaj reklampresaĵoj. Abunda kvanto da plej variaj kaj belaspektaj originalaj skribdesegnaĵoj konvinkis la vizitantojn pri alta artisma grado, kiun atingis nia simpatia amiko. Speciale ni kun ĝojo rimarkis serion da esperantaj tekstoj, kiuj samtempe servis kiel bona atentigilo pri nia lingvo.

Praha. La Esp. Klubo „u Donátů" festis per amika kunveno, okazinta la 9. XII. 1911 en kancelario de B. U. E., la naŭan datrevenon de sia fondiĝo. S-o Ed. Kühnl rememorigis per kelkaj vortoj la unuan tempon de nia movado en Bohemujo, speciale en Praha; poste dum intima amuzo oni aranĝis humoran „paroladon kun lumbildoj" pri zoologio. Nur je noktomezo disiris la amikaro el gastama rondo. — La klubo atentigas, ke la gazetoj elmontrataj en la kafejo „Union" estas ĝia propraĵo kaj petas, ke oni traktu ilin kiel havajon de societo, kiu konservadas ilin en sia biblioteko: oni do bonvolu ne fari siajn rimarkojn

en la teksto. ĉar alie la klubo vidus sin esti devigata rifuzi la disponigon de la gazetoj por publika uzo. — Novaj kursoj de la Boh. Propaganda Soc. komenciĝis en januaro en la kancelario de B. U. E. Estas malfermitaj tri kursoj: elementaj kaj supera, gvidataj de s-oj B. Davídek, Ed Kühnl, J. Pech, A. Zahel. Ĉiu kurso daŭros tri monatojn: kotizajo 2 K.

Do knihovny svazu „Ligo de Bohemaj Esperantistoj“ přibyla díla:

č. 61. G. Török: *Porĉiama Kalendaro* (22 pĝ.):
č. 62. *a)* Balucki-Ender: *Ama bileto*, unuakta komedio (48 pĝ.):
b) Orzesko-Ender: *A. B. C.* (72 pĝ.):
č. 63. W. S. Stoner: *Patrino Anserino* (24 pĝ.):
č. 64. Gen. Sébert: *L'Espéranto et les langues nationales* (24 pĝ.):
č. 65. Čehov-Kotzin: *Du rakontoj* (30 pĝ.):
č. 66. S-ino Vallienne: *La gasto*, duakta orig. komedio (30 pĝ.):
č. 67. Venchieredo-Tellini: *La idilio ĉe la fonto* (32 pĝ.):
č. 68. Feydeau-Doré: *Kial ili estas famaj?* (11 pĝ.):
č. 69 Sieroševski-Kabe: *La fundo de l' mizero* (91 pĝ.):
č. 70. *„La Revuo“*, jarkolekto IV. 1909—10 (576 + 156 pĝ.):
č. 71 *„La Revuo“* jarkolekto V. 1910—1911 (576 + 192 pĝ.):
č. 72. Poruks-Kerkau: *Vakciniuja krono* (30 pĝ.);
č. 73. Th. Cart: *Pri la indoeŭropaj lingvoj kaj Esperanto* (15 pĝ.):
č. 74. *b)* S-ino Hankel: *Sableroj* (91 pĝ.);
c Molière-Velten: *La malsanulo pro imago* (98 pĝ.);
č. 75. Jost: *Esperantista kantaro* (39 pĝ.):
č. 76. Ramuz - de Saussure: *Aline* (138 pĝ.):
č. 77. Dr. Schulhof: *Kion la vivo alportis* (30 pĝ.):
č. 78. *Esperanta psikistaro* (80 pĝ.):
č. 79. H de Balzac-Merckens: *La Vendetta* (120 pĝ.).

Esp. klubo en **Praha VIII.** anoncas publikan kurson por komencantoj en la lernejo „Na Palmovce“, kiu komenciĝis la 19. I. — Pri la kunveno de reprezentantoj de Centra Asocio B. U. E. kaj de la grupo „Verda Stelo“ ni raportos en la sekvanta numero. — En Smíchov aperanta boh. revuo „Rodina“ enhavas regulan esp. rubrikon, redaktatan de s-o M. Bartoš. — En la semajna gazeto „Ohlas od Nežárky“ aperanta en Jindřichův Hradec estas represitaj du felietonoj sub titolo „Ŝlosilo por la internacia organizaĵo“; en ili nia meritoplena samideano s-o inĝ. Hofmann el Smíchov konatigas la legantaron kun la nuna stato de nia movado. — En la 2a n-o de la bohema gazeto „Pravda“ aperanta en Wien publikigis s-o parohestro J. M. Bakalář artikolon pri internacia helplingvo. — En la varietea teatro en Praha ludis sian humoran scenon „La frakasita spegulo“ nia konata samideano s-o K. Schwarz, sekretario de la Esp. Varietea Ligo, kun kiu paroli havis okazon kelkaj membroj de nia klubo.

Esp. klubo en **Kladno**: kurso, gvidata de s-o J. Sídlo el Praha havas 38 lernantojn. Ĉe okazo de la laborista ekspozicio en 1911 vizitis la klubon pli multe ol 30 gastoj el Praha kaj ĉirkaŭaĵo, kiuj estis akceptitaj de la urbestro en la urba domo. La supre nomita s-o havis tiame paroladon pri E. kaj laboristaro. La esperanta sekcio en la ekspozicio, pri kiu ni parolis jam la pasintan jaron estis premiita per diplomo de unua klaso kun rajto presi oran medalon. — En **Mikulovice** ap. Svitavy malfermis s-o faka instruisto Josef Jeřábek en ĉiuj tri klasoj de la burĝa lernejo kursojn devigajn por ĉiuj gelernantoj. Krom la lecionoj por ĉiu aparte

okazas ĉiusemajne leciono komuna, konversacia. Krom tio li aranĝas vesperan kurson por plenaĝuloj, kiujn partoprenas dudek vizitantoj. Kiel profundan intereson por E. havas la adeptoj de s-o Jeřábek pruvas, ke en tiu ĉi ne granda urbo 27 Esperantistoj abonas nian revuon. — Esp. Klubo en **Radvanice** aranĝis la 10. XII. solenan kunvenon kun bohema parolado por festi la datrevenon de naskiĝo de Dr. Zamenhof.

Bohemoj en fremdlando. En Barmen malfermis la 7. de Jan. s-o Maryška du kursojn pri E. por Bohemoj.

KORESPONDANTOJ: *1. Esperanto-Oficejo en *Bagdad*, Turka Arabio (Poste angl.) dez. kor per ilustritaj kartoj — *2. La lernantoj de la liceo en St. Omer dez. kor. kun nefrancaj Esp. Skribu unuafoje al s-o prof. Deligny. bd. Vauban, *St. Omer*, (P. de C.) France. — *3. S-o Jos. Prat, *Tarrassa*, Plaza 19. Hispanujo. — *4. S-o Petr Romanovič Bezrukih, instruisto, Krasnij-Jar. Verhnendinskij ujezd, Zabajkalska obl. Ruslando (int. il. kartojn. kiujn li povus uzi kiel lernilon ĉe la lecionoj de geografio). — *4. S-o Carlos Charrier, Cerrito 48 b *Montevideo*, Uruguay, Suda Ameriko (ĉiam resp.). — *5. S-o Arthur Vermandel. *Borgerhout-Antwerpen*. 72. Borgerhoutstreet. Belgujo (int. poŝtmarkojn). — *6. S-o B N. Alekseev, *Tomsk*, Simonovskaja 28. (il. k.). — *7. S-o T. K. Haseltine, telegrafisto, *Pontefract*, Anglujo (il. k.). — *8. S-o Paul Goris. *Bruxelles* 181. rue Royale, Belgujo (int. poŝtm.) — *9. S-o Ant. Cocks, stud. fil., *Antwerpen*, Tol str. 52. Belgujo (int. il. k. kun marko bildflanke). — *10. S-o In. Serišev. pastro, *Krasnij Jar.*, Zabajk. obl. Verhnendinskij ujezd. Ruslando (il. k.: p. m.). — *11. S-o Lorenzo Margarit, *Tarrasa. Barcelona* Calle Angeles 57. Hispanujo. — *12. S-o David W. Peacock, *Cincinnati*, Ohio 3449. Wilson-ave. U. S. A. (kolektas esp. kuriozajojn). — *13. S-o Methodio Maranhão, advokato, *Goyanna*, Pernambuco, Brazil. — *14. S-o Robert Bartels, *Braunschweig*, poste rest., Germ. (il. k., ĉiam, tuj resp.). — *15. S-o Curtis B. Lore, Danville. Penn'a, U. S. A — *16. S-o Wilhelm Löffler, *Braunschweig*. Pfingststrasse 3. Germ. — *17. S-o Tomás Vibé, artpentristo. *Tarrasa Barcelona*, 42. str. Media del Paseo, *Hispanujo*. — *18. S-o Ing. G. Baire. *Boulogne s. M.* 74. rue des Pipots, Francujo (kolektas glumarkojn eldonitajn ĉe diversaj okazoj, festoj, ekspozicioj k. s.).

DŮLEŽITÉ! Národní Obzor, ve kterém vycházela esp. rubrika, redigovaná z ochoty Ústředním Svazem B. U. E., přerušil náhle další uveřejňování esp. statí. Příčinou toho jest nabídka idisty p. Kajše z Moravy, který reklamoval rubriku tuto také pro bezcenný plagiát Esperanta — Ido. Redakce, chtíc být „neutrální“, vyhověla by jeho žádosti, nevědouc, že hnutí idistické omezuje se na několik osobních přátel jmenovaného propagátora Ida, který, jako Idisté vůbec všude, dovede vetříti se v první řadě tam, kde, dík Esperantistům, získáno pochopení pro naši myšlénku. Redakce „N. O.“, nemajíc prý dosud o věci vlastního názoru, považuje dle všeho ze nejpohodlnější, ignorovati snahy o jazyk mezinárodní vůbec. Proto jest třeba, aby každý přítel naší věci **ihned** zaslal „N. O.“ (Praha II., Jungmannova tř.) **důtklivý pokyn s informací**, že jen dík esp. rubrice stal se čtenářem „N. O.“, a vysvětlil, že bezvýznamnost hnutí idistického nezaslouží pozornosti tisku. Důrazně žádej každý pokračování rubriky pouze esperantské!

UPOZORNĚNÍ.

Nemluvili bychom na tomto místě bez podstatných příčin o měsíčníku „Český Esperantista“, který vycházel do konce roku 1911 vydáván panem Iglauerem (dříve firmou Boháček na Moravě, později firmou Ryšavý v Praze). Všechna dosud vydaná čísla tohoto „esperantského“ časopisu přesvědčivě dokazují, že vydavatelům jedná se pouze o příležitost k urážení našeho Ústř. Svazu B. U. E., jeho funkcionářů i přátel, kterážto příležitost má jim býti zaplacena penězi neinformovaných stoupenců Esperanta, jimž vnucují svůj „orgán“ pod záminkou ukázkových čísel. I ti, kdo vrátili ukázkové (neobjednané!) číslo, jsou dnes takovouto formou upomínáni otevřeným korrespondenčním lístkem o vyrovnání předplatného za celý ročník:

„Vzhledem k tomu, že podala Jste proti upomínací žádosti naší odpor, nezbývá, než abychom podali na Vás řádnou žalobu pro dlužný obnos, který nyní s útratami činí 5·53 K. Ukázkové číslo Jste vzdor výslovnému podotknutí na obálce, že ten, kdo jej do 8 dnů nevrátí, stane se odběratelem, nevrátila, nýbrž ponechala Jste si i veškerá další Vám zaslaná čísla, ale nyní do placení se Vám nechce. Dle naříz. min. spr. 16/č. 1902 Bdw. 34.777 stala Jste se tím odběratelkou i my jsme zákonnému nařízení učinili zadost. Nemáme času se s Vámi o ten nepatrný obnos tahati a proto předáváme celou záležitost advokátovi k vymáhání žalobou. Nechtěla Jste platit jednoduché útraty, zaplatíte tedy ještě advokáta. Nikdo Vás k odbírání nenutil, když Jste nechtěla odbírati, mohli jsme od Vás tolik slušnosti očekávati, že číslo vrátite. S úctou Český Esperantista.“ (Bez podpisu.)

Velice často býváme nyní osobně i písemně žádáni o vysvětlení postiženými obětmi, které v domnění, že naše redakce **„Časopisu Českých** Esperantistů“ takovýmto způsobem vymáhá předplatné, ohražují se u nás proti neoprávněnému chikanování. Upozorňujeme, že nikdy jsme nikoho neupomínali takovýmto způsobem, nikdy jsme nepředali k soudnímu vymáhání ani oprávněné své pohledávky a tím méně neoprávněné! Když zaslali jsme někomu ukázkové číslo, nežádali jsme, aby nám je vracel, a ponechal-li si je, aniž by se stal předplatitelem, nikdy nebyl námi upomínán. Těšilo nás vždy vědomí, že ukázkovými čísly získali jsme alespoň pozornost Esperantu. Víme velmi dobře, že nikdo není povinen platiti za publikace, kterých neobjednal. Nelze bohužel vystříhati se ani v esperantském životě stykům s podnikateli, kteří kladou zájem osobní nad zájem Esperanta. Nemáme nic společného s výše jmenovanou „redakcí“ a „vydavatelstvím“, které vymáhají neoprávněné pohledávky mezi českými Esperantisty způsobem, o němž každý čtenář učiní si náležitý úsudek.

Redakce **„ČASOPISU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“.**

Eldonanto: Ed. Kühnl. Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.